

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 3 / 2014



Gimnastika artfajraĵo Esperanto



Fine de decembro kaj dum januaro 2014 tra Germanio turneis gimnastika prezento kun la nomo “TUI Artfajraĵo de gimnastiko – Esperanto”. 200 mil homoj vidis la spektaklon, kaj pluraj milionoj legis la titolon kaj la mencion de nia lingvo. La gimnastika turneo okazas ĉiujare, sed ĉi-foje la organizantoj nomis ĝin laŭ nia lingvo kaj kunvokis artistojn el la tuta mondo. Ili en la gazetaraj anoncoj parolis pri la “rekonita internacia mondlingvo” aŭ la “popolojn liganta lingvo”. Kantistino dum la spektaklo kantis en Esperanto nian himnon, kun nova melodio. Kaj la gazetoj dum semajnoj ĉe ĉiu prezento menciis Esperanton, ofte konstatante: “Same kiel la lingvo tiel ligas la gimnastika arto.”

Eble ĝuu la gimnastikan prezenton dum minuto <http://tinyurl.com/Gimnastiko>, aŭ dum horo <http://tinyurl.com/Esperanto-gimnastiko>.

Kial ili elektis la nomon “Esperanto” kaj kial la turisma entreprenego TUI apogis tion? Kial simile subtenis nin dum la pasintaj jaroj BMW, la Cirque du Soleil, granda germana hotelo *Esperanto*, BT Global Services, la ĉina registaro k. a.

Kial la vikipedio-kunlaborantoj petas, ke ĉiu lingvo-versio enhavu artikolon pri Esperanto? Kial Google Translate tradukas Esperanton?

Ili akceptas nian mesaĝon kaj la faktan uzadon de Esperanto. Nia lingvo kompare kun aliaj lingvoj kutime troviĝas ie inter la 15a kaj 50a loko (inter ĉ. 6000 lingvoj de la mondo) – simile kiel la dana aŭ serba-kroata lingvoj. Ni multege progresis ekde 1887. Kaj ni plu progresas – ekzemple en Hungario la nombro de Esperanto-parolantoj kvarobliĝis inter 1990 kaj 2011.

Kaj kion ni faru estonte?

– Ni plu ĝuu Esperanton. Tio estas bona por ni kaj ĝuo estas alloga por eksteruloj.

- Due ni plukonstruu Esperantujon.
- Trie ni plibonigu kaj intensigu nian eksteran informadon. Indas prezenti Esperanton kaj Esperantujon de hodiaŭ. Ni prisilentu niajn planojn pri fina venko, dum ĝi estas tiom for. Ankaŭ pri la angla ne indas multe paroli. Nek batali kontraŭ Esperanto-malamikoj. Por sukcesigi Esperanton ni prezentu ĉefe ĝin mem.

Ĝuu Esperantujon kaj parolu pri tio!

Lu Wunsch-Rolshoven (EsperantoLand)



K O L O F O N O

39a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



A G Ĉ E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono,
 Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
 bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

MAJO

Merkredo la 28a 18:30 - 20:00 **Prelego : Valère Doumont** «Kion proponi ene de Esperanto-movado al adoleskantoj»

Sabato la 31a 14:00 - 18:30 **Serĉpromenado en Gento**
 Informoj : gent@esperanto.be

JUNIO

Sabato la 7a 14:00 - 16:00 **Konversacia rondo en Dilbeek**
 Lydia 054/33 01 51

Merkredo la 11a 18:30 - 20:00 **Prelego : Kristin Tytgat**
 “Vintra naĝado: ĉu nur por ursoj?”

Merkredo la 25a 18:30 - 22:30 **Sezonfina vespermanĝo ĉe « Kriti», greka restoracio sur la ĉarma placo de Betlehemo**
 Chée de Forest 112 Vorstlaan - 1060 Bruselo
Bonvolu nepre aliĝi ĉe Nikolao

JULIO - AŬGUSTO - SEPTEMBRO

* La kunvenoj daŭrigos dum la monato Julio, sed **ne en Aŭgusto**

Vendredo la 11a ĝis la 13a de Julio **La Semo : Muzik-, Cirk-, teatro-festivalo** - Enghien-Edingen. Esperanto-budon ni starigos kunlabore kun APE en la asocia zono, kie Gijom Armide eble kant-prelegos sur scenejo. Trovu la ĝeneralajn informojn tie : www.lasemo.be/2014/

Sabato la 16a ĝis la 23a de Aŭgusto **FESTO 2014 : Tutsemajna Muzikfestivalo** organizita de JEFO okazos ĉi-jare en belega regiono en Pont-de-Barret proksime de Montélimar (Francio). Vizitu la prian retpaĝon : www.alesk.eu/festo2014/

Merkredo la 10a de Septembro 18:30 - 20:00 **Kunveno kaj kursoj** :
 Unua kunveno de la nova sezono ĉe EBG

Saluton Kara Legantaro !

Li estas unu el la plej famaj artistoj de la 20a jarcento. Ĉie pleje famiĝis lia bastono, ĉapelo kaj liaj lipharoj. Fama anti-faŝisto. Cigana deveno per sia patrino.... Kiu estas li?...

Charlie Chaplin kompreneble, kiu ofertis al la homaro genion sed ankaŭ videcon !

Tre baldaŭ, oni voĉdonos ĉe balotadoj kaj elektos... kiajn politikajn strategiojn por ni mem (la 99% ;-)) ? Certe estas nuntempe perfekta momento por relegi (aŭ re-spekti) la eltiraĵon de la parolado el la filmo «La Granda Diktatoro» de *Charlie Chaplin* (paĝo 6).

Vi povos trovi facile tiun filmon kaj dokumentojn (bonusojn, ktp...) ĉe Mediatekoj en Bruselo... Kaj profiti la okazon por lui KD-ojn de Esperanto-muziko !!! Jes ja, eblas, sed nur ĉe la



«Médiathèque de Woluwe-Saint-Pierre». Do, vizitu tiun agrablan, interesan lokon kaj luan KD-ojn por konigi muzikojn en Esperanto ĉirkaŭ vi !

Bonan legadon !

Viaj redaktoroj

aktuala@esperantobruselo.org

Le Monde diplomatique

★ en Esperanto - eo.mondediplo.com

Enhavo

- Paĝo 2 : Esperanto Tournée
- Paĝo 3 : Kolofono kaj Agendo
- Paĝo 4 : Edito kaj Enhavo
- Paĝo 5 - 7 : La universo en Esperanto
- Paĝo 8 - 9 : Eltiraĵo de La Granda Diktatoro
- Paĝo 10 - 11 : La Retiriĝo
- Paĝo 12 : Kiel disvastigi efike Esperanton ?
- Paĝo 12 : Voĉo de la Tempo
- Paĝo 13 - 15 : Junĉjo Metodo
- Paĝo 16 : Kongreso de EEU en Riejka
- Paĝo 17 - 18 : Biciklo tra la Mondo
- Paĝo 19 - 20 : Kial usonano uzas Esperanton ?



La universo nun alireblas en Esperanto

Ĝus ekfunkciis la Esperanta fasado de la populara astronomia retejo Heavens-Above.com. La aŭtoro de la Esperanta traduko estas la ukrainia esperantisto kaj amatora astronomo Paŭlo Moĵajevo, kiu uzas la paĝaron precipe por trovi la situon de artefaritaj satelitoj. En intervjuo de Libera Folio li rakontas, kial li entreprenis la taskon, kaj por kio la Esperanta versio povas utili.



Stela mapo el la retejo

Libera Folio: Pri kia retejo temas?

Paŭlo Moĵajevo: – [Heavens-Above](#) estas laŭ la aspekto simpla, sed tre oportuna kaj informoriĉa astronomia paĝaro, kiu povas esti utila kaj por la profesiaj, kaj por la amatoraj astronomoj. Ĝi ebligas facilan serĉon de interesaj ĉielaj objektoj (kiel planedoj, brilaj asteroidoj, kometoj), prezentante facile kompreneblajn serĉ-mapojn por ĉiu objekto. Ĝi ankaŭ ebligas preparon de ĝeneralaj stelaj mapoj por ĉiu punkto de la Tero kaj difinita tempo. La paĝaro ne okupiĝas pri la objektoj de la profunda kosmo (kiel nebulozoj kaj foraj galaksioj – ilia pozicio estas relative fiksa kaj oni povas ekscii ĝin el ĉiu ajn priastronomia libro), sed kompanse prezentas tre oportunajn kaj potencajn mekanismojn por prognozi la aperon de

multaj brilaj kaj malbrilaj artefaritaj satelitoj de la Tero.

En kiuj lingvoj la retejo funkcias?

– Ĝis antaŭnelonge la paĝaro estis nur anglalingva, sed antaŭ kelkaj semajnoj aperis la eblo traduki ĝin al diversaj lingvoj. La Esperanta fasado iĝis la dek-kvara en la vico de jam funkciantaj tradukoj.

Kial vi decidis okupiĝi pri la traduko?

– Mi interesiĝas pri astronomio jam ekde la lernejaj jaroj. Antaŭ ĉirkaŭ jaro mia intereso revigliĝis dank’ al la aĉeto de negranda teleskopo, kio aktualigis la demandon: kion interesan mi povas ekvidi per ĝi? Mi do devis aktive krozi en la reto por trovi oportunajn informfontojn. Unu el la paĝaroj, kiujn mi uzas seninterrompe jam dum jaro, estas ĝuste Heavens-Above.

– La paĝaro plene kaptis min dank’ al unu interesa funkcio: ĝi kapablas prognozi la traflugojn de brilaj artefaritaj satelitoj kaj, speciale, la tiel nomatajn ekbrilojn de Iridiumoj. Temas pri tre interesa spektaklo, kiam en la ĉielo por kelkaj sekundoj ekbrilas tre hela “stelo”, kiu poste estingiĝas (kaj tiu evento okazas en ĝuste antaŭdiritaj loko kaj tempo). Tiuj ekbriloj estas de tempo al tempo produktataj de la satelitoj de la sistemo “Iridium”, kiuj havas tre specifan formon, havante kelkajn grandajn antenojn. Foje la antenoj de la satelito spegulas la sunan lumon, kreante sur la tera surfaco mallarĝan helan strion. Por la surteraj observantoj la spektaklo estas vere pasiiga! Por observado ĝi bezonas nenion specialan: nur serenajn ĉielon kaj ĝustajn informojn pri la tempo kaj loko de la ekbrilo.

– Kiam aperis la eblo traduki la paĝaron al la aliaj lingvoj, mi nature ekpensis pri la Esperanta traduko. La kreinto de la paĝaro, germano Chris Peat, tuj konsentis kun mia propono. La tradukado mem estis efektivigata per la viki-simila maniero, proponata de la paĝaro mem. Krom fari la Esperantan tradukon, mi partoprenis ankaŭ la tradukadon de la paĝaro al la rusa lingvo (kune kun du aliaj volontuloj).

Ĉu vi facile sukcesis trovi la necesajn terminojn en Esperanto?

– Verdire, antaŭ ol komenci la laboron, mi esperis, ke la stato de la astronomia terminologio en Esperanto estas tute bona (ve, mi estis tro optimisma!). Dum la laboro mi uzis, kompreneble, NPIV-on, la Retan Vortaron, foje ankaŭ la Esperanta vikipedio helpis (tamen mi uzis ĝiajn proponojn tre singarde); sporade mi konsultis ankaŭ kelkajn E-nacilingvajn vortarojn. Kiel tre gravan fonton mi konsideris la Astronomian Terminaron (kiu estas projekto de Astronomia Esperanta Klubo; bedaŭrinde la terminaro ŝajnas malaperi el la reto, sed mi feliĉe havis malnovan konservitan kopion), sed ankaŭ ĝi foje prezentis la aferojn iom konfuze aŭ ne enhavis la necesajn terminojn.



Eblas surrete alklaki la mapon por pligrandigi la respondan parton de la ĉielo



La orbitaj datenoj estas ricevitaj el la jena dulinia datenaranĝo de la orbitaj elementoj:

```
1 000050 580028 14055.53830608 .00000027 00000-0 60567-4 0 1964
2 00005 034.2452 126.8529 1849393 062.8436 314.8523 10.84388329955063
```

– Dum la laboro mi multfoje alfrontis la situaciojn, kiam necesis elekti unusolan varianton inter kelkaj eblaj. Foje tio estis sufiĉe facila (ekzemple, por traduki la nomon de la zodiaka konstelacio Aquarius mi elektis la formon Akvisto, forĵetinte la NPIV-an sinonimon Amforo), foje – ne (ekzemple, por alnomi la angulan alton de astro mi ekuzis la tradukon altangulo, kvankam ankaŭ la varianto altitudo ŝajnis esti uzebla; mi tamen preferis uzi ĝin en malvasta senco “alto super la marnivelo”).

Ĝenerale, mi uzis nur la jam ekzistantajn tradukojn, kvankam kelkajn vortojn, mankantajn en miaj vortaroj, mi ja ekuzis (ekzemple, “libracio”).

– Tutcerte, mia traduko povas enhavi iujn mankojn kaj plibonigendaĵojn.

Feliĉe, eblas daŭre redakti ĉion redaktindan; do mi invitas ĉiun, kiu trovas iun eraron, kontakti min. Nuntempe ankoraŭ ne ĉiuj paĝoj estas tradukeblaj (do vi povas foje renkonti en la paĝaro anglalingvajn fragmentojn), sed la prizorganto konfirmis, ke post iom da tempo aperos la eblo traduki la reston. Do, la laboro plu daŭras, kvankam entute la paĝaro jam funkcias en Esperanto.

Kial laŭ vi indis entrepreni tian laboron? Certe ekzistas tre malmultaj amatoraj astronomoj, kiuj ja scias Esperanton, sed ne komprenas la anglajn terminojn de la fako?

– Unue, ĝi estas relative facila maniero plian fojon montri al la mondo, ke Esperanto ja ekzistas (certe, bonvenus pli da regulaj vizitoj fare de esperantistoj). Due, ĝi estas plia ekzemplo de relative malmultaj fakaj aplikoj de nia lingvo. Certagrade ĝi povas ankaŭ kontribui al plia stabiliĝo kaj vastiĝo de la Esperanta terminologio. Ekzemple, mi kun miro konstatis, ke tute ne ĉiuj nomoj de konstelacioj estas prezentitaj en NPIV (ial mi atendis la malon). Krome, mi trovis kelkajn evidentajn misojn en la difinoj de la Reta Vortaro, pri kio mi certe informos la koncernajn respondeculojn.

Kial laŭ vi la esperanta traduko de la retejo povos utili al ordinaraj esperantistoj?

– La paĝaro utilos al ĉiu, kiu interesiĝas pri la vivo ĉirkaŭ ni ĝenerale kaj pri la ĉielo aparte. Se vi posedas eĉ simplajn optikajn instrumentojn, dank' al tiu paĝaro vi povas trovi kaj observi la plej brilajn planedojn kaj kometojn. Ankaŭ la facile legeblaj stelmapoj kun la Esperantaj konstelaci-nomoj povas esti interesa kaj utila agrablaĵo. Aparte interesa por ĉiu homo, eĉ malmulte interesiĝanta pri astronomio, povas esti la observado de la Iridiumaj ekbriloj (kun iom



da lerto vi povas eĉ amuzi kaj mirigi viajn konatojn “lumiginte stelon”).

Finfine, la paĝaro eble vekos vian interesiĝon pri astronomio, kiu ja povas esti tre interesa hobio.

– Kompreneble, por profiti ĉiujn avantaĝojn de la paĝaro bezonatas almenaŭ la bazaj scioj pri la stela ĉielo kaj astronomio ĝenerale (kaj ankaŭ iom da observaj spertoj). Sed, mi ripetu, la paĝaro provizas kaj posedas relative simplajn mekanismojn, ebligantajn uzi ĝin eĉ al malspertuloj.

Kiel oni uzas la retejon?

– Unue, simple vizitu heavens-above.com. En la supra dekstra angulo de la paĝo vi povas elekti la lingvon helpe de falmenuo.

Tre dezirindas registriĝi, ĉar la registritaj uzantoj povas konservi la informojn pri sia observo-loko (ĝi devas esti indikita laŭeble pli ĝuste, ĉar tio grave influas la ĝustecon de la prognozoj pri satelitoj).

Kaj poste simple ĝuu! Mi ja estus ĝoja, se esperantistoj subtenus mian laboron per vizito en la paĝaro (nepre elektu Esperanton kiel la preferatan lingvon!), registriĝo kaj regula uzo.

Mi ankaŭ bonvenigas ĉiujn kritikojn koncerne la detalojn de la traduko.





Eltiraĵo de la parolado el «*la Granda Diktatoro*» Charlie Chaplin

"En epoko de progresinta teknologio, la plej granda danĝero por la ideoj, la kulturo kaj la spirito riskas pli veni de malamiko kun ridetanta vizaĝo ol de kontraŭulo inspiranta teroron kaj malamon."

Aldous HUXLEY, 1931

Mi pardonpetas, sed mi ne deziras esti imperiestro.

Tio ne estas mia afero.

Mi volas neniun direkti aŭ konkeri.

Mi dezirus laŭble al ĉiuj helpi :
al judoj, nehebreoj, blankuloj kaj nigruloj.

Ni ĉiuj emas al reciproka interhelpo.

Tiaj estas homoj.

Ni ĉiuj deziras vivi per alies feliĉo, ne per alies mizero.

Ni ne deziras reciprokan malamon kaj malestimon.

En ĉi tiu mondo estas loko por ĉiuj kaj la tero estas riĉa

kaj povas ĉiujn provizi.

La vivo povas esti libera kaj bela, sed ni perdis la vojon.

Avideco venenis la homan koron, per malamo barikadis la mondon, puŝis nin al mizero kaj sangoverŝado.

Ni krekiĝis rapidecon sed enfermis nin mem en maŝinaro kiu donas abundon sed kiu lasas nin nekontentaj.

Nia scio igis nin cinikaj, nian spiriton malfacila kaj nebonkora.

Tro multe ni pensas,
tro malmulte ni sentas.

Pli ol maŝinaro ni bezonas homecon.
Pli ol spirito ni bezonas bonkorecon kaj afablecon.

Sen tiuj kvalitoj, vivo fariĝos violenta kaj ĉio estos perdita.

Aviado kaj radio pliproksimigis nin.

La naturo mem de tiuj inventaĵoj vokas al homa boneco, vokas al universala frateco,

al la unueco de ĉiuj el ni.



Jam nun, mia voĉo tutmonde atingas milionojn da senesperaj viroj, virinoj kaj etaj infanoj, viktimoj de sistemo kiu torturas kaj enkarcerigas senkulpulojn.

Al tiuj, kiuj povas min aŭdi, mi diras :

"Ne malesperu !".

Nia nuna malfeliĉo estas rezulto de avideco kaj malmildeco de tiuj kiuj timegas la vojon al la progreso de la homaro.



Malaperos malamo, mortos la diktatoroj, kaj regpotenco deprenita de la popolo revenos al la popolo.

Kiel longe homoj scipovos morti, same vivos libereco.

Soldatoj ! Ne donu vin al brutuloj, al minoritato kiu malestimas vin - sklavigas vin - kaj trudas al vi siajn far- , pens- kaj sent-manieron kiel al bestoj, kiel al kanonkarno.

Ne donu vin al ĉi tiuj nenaturaj viroj, maŝino-viroj, kun maŝino-mensoj kaj maŝino-koroj. Vi ne estas maŝinoj. Vi ne estas bovoj. Vi estas homoj.

En viaj koroj estas la amo al homeco. Malamon vi ne havas.

Nur malamon al malamo.
Nur al tio kontraŭama kaj kontraŭnatura.

Soldatoj !
Ne batalu por sklaveco, batalu por libereco.
En la Evangelio de sankta Luko estas skribite :
«*La reĝolando de Dio troviĝas en la homo* ». Ne en ununura homo, sed en homgrupo, sed en ĈIUJ homoj !

Vi, la homoj, posedas povon, la povon krei maŝinojn. La povon krei feliĉon !
Vi, la homoj, havas la povon estigi la vivon bela kaj libera, la povon fari el tiu vivo mirindan aventuron.
En la nomo de Demokratio, ni uzu tiun povon.

Necesas ke ni unuiĝu, necesas ke ni batalu por nova mondo, por homeca mondo kiu alportos al ĉiu la eblecon labori, estonton al la junularo, kaj sekurecon al la maljunularo.



Ĉion promesis al vi tiuj brutuloj, por ke vi havigu al ili la povon : ili mensogis. Ili ne plenumis siajn mirindajn promesojn : neniam ili faros tion.
Diktatoroj liberiĝas per akiro de la povo sed sklavigas la popolon.
Nu, ni batalu por la realigo de ĉiuj iliaj promesoj.
Ni batalu por liberigi la mondon, por faligi la naciajn kaj rasajn barojn, or forpuŝi avidemon, malamon, netoloremon.

Necesas batali por konstrui mondon de racio en kiu scienco kaj progreso kondukos ĉiujn homojn al feliĉo.
Soldatoj, ni unuiĝu je la nomo de demokratio !

Hannah, ĉu ci povas aŭdi min ?
Kie ajn ci estas, rigardu supren, Hannah !
La nuboj disŝiriĝas.
Aperas la suno.
El mallumo ni eliras por trovi la lumon.
Ni eniras novan pli bonan mondon kie la homoj venkos sian monavidecon, sian malamon kaj sian brutecon (kruelecon ?).
Rigardu supren, Hannah !
La homa animo ricevis flugilojn kaj komencis ekflugi.
Ĝi ekflugas al la ĉielarko, al la lumo de l'espero.

Rigardu supren, Hannah ! Rigardu supren !



La Retiriĝo (La Retirada) - Tradukita kaj adaptita de Floreal Martorell



la respublika armeo, el popola origino (kamparanoj kaj laboristoj) estas la plej multnombraj.

Virinoj, infanoj kaj maljunuloj estas malplिनombraj. La statistikoj de la formigrado kalkulas la ĉeeston en Francio de 68.035 infanoj, 63.543 virinoj, 9.029 maljunuloj, 11.476 izolitaj batalantoj, 180.000 batalantoj en la koncentrejoj kaj fine 10.000 en hospitaloj, sume 201.476 soldatoj.



Malantaŭ la pikdratoj en la koncentrejo de Argeles



La 25a divizio (eksa Durruti-Kolono) malliberigita en la kastelo de Mont-Louis



Elaerfoto de la koncentrejo de Argeles februaro 1939

14.000 rifuĝintoj mortos tie de februaro ĝis marto 1939 pro siaj vundoj, aŭ pro stato de ekstrema malforto kaj pro manko de flegado.

La ekzilitoj reprezentas bonan specimenon de la hispana socio, tamen la batalantoj de



CAMP DU VERNET D'ARIEGE

Disciplina koncentrejo de Vernet d'Ariège kie estis forportitaj la eksbatalantoj de la 25a Divizio (Durruti- Kolono) taksitaj kiel danĝeraj anarkiistoj

Je la eniro en Francio, rifuĝintoj estas zorge kontrolataj kun detala priserĉado kaj estas devigataj forlasi ĉion kion ili posedas: armilojn, municiojn, meblojn, brutaron (pli ol 1500 ŝafoj, 600 bovinoj...) kaj veturilojn.



Enirejo de la Vernet-koncentrejo en 1940



Priserĉado ĉe la landlimo fare de la ĝendarmoj

- Tri eblecoj prezentiĝas al la rifuĝintoj:
- instaligo en Francio ,
 - reveno al Hispanio (propravole aŭ perforte)
 - akceptigo en aliaj landoj.



Deponitaj armiloj kaj municioj ĉe la landlimo (Le Perthus) - februaro 1939

Ekde aprilo 1939 , iuj hispanoj, taksitaj kiel maldezirinda de la francaj aŭtoritatoj, estas forpelitaj rekte al Hispanio.

Tutplenaj karavanoj de virinoj, infanoj kaj vunditoj, por kiuj la franca registaro esperas la indulgon de la faŝisma reĝimo, ankaŭ estas forpelitaj al Hispanio. Por instigi plejmulton de alvenantoj reveni hejmen la registaro dissendas en la koncentrejoj frankistan alvokon kiu promesas al ili indulgemon revene.

La francaj aŭtoritatoj organizas grandaj konvojojn inter la 1a kaj la 19a de Februaro, 50.000 hispanoj revenas en Hispanion.

La vickolonelo Henry Morel, milita ataŝeo en la ambasado de Francio en Hispanio, ĉeestis la fruajn tagojn de la civila milito en julio 1936. Kontraŭfaŝisto, kiu apogas legitimecon de la Respubliko, en pluraj okazoj li avertis la francan registaron pri la malfacila situacio de la hispanaj respublikanaj trupoj.

"Ilia kuraĝo ne povis kompensi la mankon de materialo. " Komence de marto 1938, li iris al Parizo por renkonti Daladier, tiam ministro pri defendo, kiu kontraŭstaras al ajna interveno pro timo de tutmonda konflikto.

(daŭrigota)

Kiel disvastigi efike Esperanton ?

De 10 jaroj Cyrille Hurstel varbas pri Esperanto kaj havas rezultojn ne kredeblajn. Lastan someron, li sukcesis meti Esperanton en televidon en Usono, Francio kaj Italio. Artikoloj estis videblaj en pli ol 20 landoj.

Ni invitas vin spekti tiun mallongan videon kiu ebligas al vi renkonti lin. Li anoncis ke li baldau malkashos siajn metodojn por havi tiom imponajn rezultojn.



Vi vidos kiel li konektighas kun homoj por ke ili sekvu lin.



Kiel Cyrille Hurstel informas 1 000 000 da personoj jare sen labori !

Por tio spektu lian videon chi tie : <http://brila-aktivulo.com>

Eduardo Galeano «Voço de la Tempo»



La naskiĝo

En la publika malsanulejo en la plej riĉa kvartalo de Rio-de-Janeiro oni prizorgis ĉiutage po milon da pacientoj, preskaŭ ĉiuj malriĉaj aŭ tre malriĉaj.

Deĵoranta kuracisto rakontis la jenon al Juan Bedoian :

- Lastan semajnon mi devis elekti inter du knabinetoj ĵus naskitaj. Ĉi tie estas unu sola spirilo. Ili alvenis samtempe, mortontaj, kaj mi devis decidi, kiu el la du vivos.

Ne estas mia tasko elekti, pensis la kuracisto, tio decidu Dio.

Sed Dio eĉ ne vorton sufloris.

Kia ajn estis lia decido, la kuracisto faris krimon.

Se li farintus nenion, li krimus duoble.

Ne estis la momento por heziti. La etuloj estis ĉe la sojlo de la morto, ili jam komencis forlasi tiun ĉi mondon.

La kuracisto fermis la okulojn. Unu el ili estis kondamnita je morto, la alia je vivo.



La Junĉjo-metodo por natura orienta kuracado



Mi povas doni kelkajn ekzemplojn:

1. 50-jaraĝa virino, kiu ne povis fleksian unuan fingron. La hospitalo rekomendis operacion al ŝi, sed ŝi elektis naturan metodon kun grenoj krudaj. Dum tri monatoj ŝia unua fingro resaniĝis. Do, ŝi ne plu bezonas operacion.

2. 20-jaraĝa virino, kiu havis haŭtan malsanon dumlonge. Ŝi vizitis orientan hospitalon kaj okcidentan hospitalon, sed ne sukcesis. Sekve ŝi akceptis la naturan kuracon pere de grenoj krudaj. Ŝi bezonis tri monatojn ankaŭ por resaniĝi tute perfekta.

3. 70-jaraĝa japana virino, suferanta pro vertebra stenozo. Kuracisto proponis operacion en japana hospitalo, sed ŝi ne akceptis ĝin kaj ŝi komencis naturan nervan kuracon (kun kuracilo). Ŝia vertebra stenozo kuraciĝis pere de nerva kuraca metodo.



Junĉjo kontrolas la sangopremon al iu virino

Kiajn rezultojn ĝenerale vi povis rimarki?

La krudaj grenoj estas unu el la plej fortaj metodoj en la originala natura kuraco. La ekvilibriĝo de sanga cirkulado de la granda cerbeto signifas, ke nia cerbo ordonas sanon al nia korpo. Ekde tiam niaj korpaj malsanoj rapide foriras.

Kiajn avantaĝojn ĝi oferas?

Oni ekscias sanigajn sciojn kaj metodojn dum tiu ĉi natura kuracado. Kaj ni komprenos kial niaj korpoj malsaniĝis per la kuracaj iradoj, kaj ni ekscios kion ni devas manĝi por gardi nian sanon dum la ĉiutaga vivo. Rezulte ni gajnos fortojn kaj sciojn, kiuj ekvilibrigos nian sanon.

Kiajn reagojn vi ricevis de la scienca komunumo, oficiala kaj ne oficiala?

Mi ankoraŭ ne klopodis kontaktiĝi kun la oficialaj organoj. Fakte nun mi disvolvas daŭre miajn kuracajn metodojn. Sed se mi havos okazon por komunikiĝi kun la organoj do, volonte mi faros tion kaj diskutos rilate nian kunlaboron. Tamen mi pliinteresiĝas pri sinceraj diskutoj rilate studtemon kun iu ajn organo ol laboraj temoj aŭ komercaj temoj. Lastatempe mi partoprenis la 2014 Vintran Esperanto-Studadon de LLG' (Libera Lernejo por Geknaboj) en Koreio.

Tie mi prezentis al la ĉeestantoj mian naturan kuracan metodon (Junĉjo metodo) per la provo de grenoj krudaj. Mi ekvilibrigis iliajn sangocirkuladon sukcese kaj la reago venis rekte post tio, t.e. la malvarmaj manoj varmiĝis kaj peza kapo malpeziĝis. Tiele la rezulto venis repide. Do, ili kontentis pro la teorioj kaj provaj rezultoj.

La rezulto estas tre valora, ĉar ilia sanga cirkulado multe pliboniĝis pere de natura metodo sen medikamentoj aŭ herbaĵo, kiuj havas tokson. Sed tamen la grenoj estas tute sekura natura sentoksa manĝaĵo.

Ĉinio estas lando de antikvaj tradiciaj kurac-rimedo, ĉu vi esploris pri ili? Kiel ili riĉigis vian konon?

Ĉinio kaj Koreio estas radikaj landoj ĉe la orienta medicino de la antikva tempo. Multaj kuracaj metodoj troviĝas en Ĉinio probable. Sed tamen Koreio mem havas diversajn alternajn medicinojn ankaŭ. Mi eksciis pri la gravaj punktoj pere de la diversaj kuracaj teorioj, kiuj disvolviĝis memstare en Koreio. Mi havas grandan intereson ankaŭ pri la ĉinaj medicinoj. Mi scias, ke Ĉinio havas grandegajn receptarojn ekde la antikvaj tempoj. Ja vere ĝi estas por mi interesa kaj respektinda. Sed tamen mi serĉis alian metodon, kiun oni povas uzi simple kaj efike. Tiuvidpunkte mi klopodis kuniĝi inter efikaj teorioj kiuj troviĝas en korea medicina kampo. Tiu ĉi kuracan metodon mi nomas 'Junĉjo metodo'.



Dum la 10-a Ĉina Esperanto-Kongreso en Zaozhuang: okaze de la fakkunsido Junĉjo klarigas sian metodon per grenoj.

Ĉu vi intencas diskonigi vian metodon en Ĉinio?

La "Junĉjo metodo" celas naturan kuracan metodon, en kies centro estas la homo kaj la orienta medicina teorio. Sed tamen okcidentaj medicinaj teorioj estas ankaŭ akceptitaj grave. La kuraca irado celas sen doloroj sed originalan kuracon laŭ natura metodo.

Ĉinio situas tre proksime de Koreio kaj du landoj reciproke vizitas multfoje. Kompreneble mi deziras ke mia kuraca metodo disvastiĝas en Ĉinio ankaŭ por sanigi malsanulojn. Mi deziras renkonti amikojn kiuj havas intereson pri mia temo.

Aldone mia natura metodo tre efikas por infanoj kaj maljunuloj ankaŭ. La grenoj sen tokso tre harmonias al ili malfortaj kaj ĝi altigas imunecon. La grenoj krudaj plibonigas sangan cirkuladon de infana kapo kaj korpo. Tiel ilia memorkapablo kaj eltenpovo pliboniĝas.

Se jes, kiamaniere? Ĉu vi opinias, ke la vigla ĉina esperantistaro povus kontribui por diskonigi vian metodon tra la ĉina popolo?

Absolute jes!

Lastatempe mi studis la ĉinan lingvon dum kelkaj monatoj. Ja la studo de la ĉina lingvo estis tre interesa al mi. Sed tamen mi sentis bezonon de tempo. Mi renkontis ĉinajn esperantistojn en 2013, unuafoje ĉe la Ĉina esperanto-Kongreso. Mi sentis varman koron de la ĉinaj esperantistoj same kiel koreo. Se estos venonta okazo mi dezirus partopreni ĉinan aranĝon denove. Mi deziras interkomunikiĝi kun ĉinaj aktivuloj esperantistaj.



Dum la 10-a Ĉina Esperanto-Kongreso en Zaozhuang: post la fakkunsido, Junĉjo kune kun la ĉinaj esperantistoj

Kiajn projektojn pri esplorado aŭ kunlaborado vi havas rilate al la natura kuracado?

Lastjare mi partoprenis francan Esperanto-aranĝon "Internacia renkontiĝo en Pluezek" rete.



Puezek (Bretonio - Francio)



Kastelo Greziljon'

Ĉijare mi estis invitita partopreni la aranĝon por prezenti mian naturan kuracon kun grenoj krudaj dum unu monato dum la "18a internacia renkontiĝo en Pluezek" kaj en la Kastelo de Greziljon. Se mia plano harmonios kun SAT-kongreso, mi ankaŭ ĝin partoprenos.

Tiujn ĉi provojn mi alte taksas. Mi havas intereson ekscii kiel ili akceptos mian azian metodon. Mi povos prezenti en tiuj lokoj kiel ni taŭge povas sanigi nin kaj kiel ni ĝuste povas kontroli la sangan cirkuladon de nia korpo.

Mi vojaĝos tutmonden kun miaj talentoj kaj komuna lingvo Esperanto. Poste mi vizitos aliajn kontinentojn ankaŭ. Mi deziras renkonti multajn amikojn, kiuj havas intereson al mia metodo. Aldone mi deziras fari sistemon por interkomunikiĝi kun tiuj ĉi temoj per Esperanto virtuale aŭ reale.

Se vi deziras ekscii pli da detaloj, bonvolu rekte kontakti Junĉjon:

Skype: juncxjo
 Reto: juncxjo@nate.com
 Tel. +82 10 3411 1232



2014-01-27



DEKA JUBILEA KONGRESO DE EEU - RIJEKA (Kroatio) JUSTA LINGVA SOLVO EN EU

Ekde la 6a ĝis la 12a de Julio 2014

La deka jubilea kongreso de EEU diskutos pri la temo «Justa Eŭropo – justa lingva solvo en EU» kion aparte substrekis en sia deklaro kroata ŝtatprezidanto Ivo Josipović, kiu aŭspicias la kongreson pro tio ke lia prezidanta programo ĉefe enhavis la celon realigi pli justan Kroation.

Li diris ankaŭ ke li mem subtenas Esperanton ĉar ĝiaj celoj, paco kaj amikeco, kongruas kun liaj politikaj kaj personaj celoj. Li invitis delegitaron de EEU al aparta akcepto kiun li faros en Junio ĉi-jare.

Kroatio estas la plej nova membroŝtato de EU kaj havas verŝajne la plej fortan tradicion de Esperanto inter ĉiuj EEU membroŝtatoj.

La jugoslavia eksprezidanto Tito, kroato, parolis Esperanton, kaj aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 1953; kroata ŝtatprezidanto Stjepan Mesić aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 2001.

En Kroatio esperantistiĝis esperantistaj famuloj kiel Ivo Lapenna kaj Tibor Sekelj kaj de tie devenas multaj aliaj gravaj agantoj por la internacia E-movado.

De tie devenas Zagreba Metodo de instruado de Esperanto, proksimume duono de ĉiuj teatraj aktivadoj en Esperanto dum la ĝisnuna historio, kaj granda daŭra informado pri Esperanto al la ĝenerala publiko.

Aliĝu do al escepte interesa kongreso, kontribuu al viglaj diskutoj pri la ĉeftemo pri kiu prelegosankaŭ neesperantistaj fakuloj kaj superaj politikistoj.


Ne nur ke vi havos la okazon serioze partopreni en grava esperantista kunveno, kies rezultojn sekvos la ĝenerala ĵurnalistaro en Kroatio, sed ankaŭ vi povos ĝui en abunda kultura programo: ĉiutage vespere okazos koncerto aŭ teatra spektaklo, kaj dumtage estos pluraj ebloj vizitkulturhistoriaĵojn en Rijeka inkluzive de la nova moderne konstruita moskeo en Rijeka.

Venu do al bela mediteranea regiono, Adriatika marbordo kaj spertu belegan naturon en facile atingebla parto de Eŭropo. Kompreneble en tia bela ĉirkaŭaĵo, en unu el la plej famaj turismaj regionoj de Kroatio, atendas vin ankaŭ pluraj ekskursoj, ĉemaraj kaj montaraj.


La tuttaga ekskursogvidas vin al ĉarmega ĉirkaŭaĵo de Rijeka, kaj vi povas aliĝi ankaŭ al 4-taga antaŭkongreso.

Informoj pri la kongreso:

<http://eeu-kongreso.webnode.com>



Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'



Albanio

(02/5 -> 07/5/2009 - 234 km => 3860 km)

▷ Ŝoko estiĝas jam de la landlimo, la vojo konsistas nur je ŝtoneteca terpado... Feliĉe, tio daŭras nur ĝis ni atingas la doganejon. La unuan riveron flankas rubaĵoj. Ne eblas trovi publikajn rubujojn, la parklokoj ĉe la vojoj kaj la bushaltejoj ĉi-cele utilas... Ja necesas konfesi, ke nia unua impresio ne tiom bone favoras.

La afero ŝanĝiĝas poste, dank' al la varma akcepto de la albana popolo. Jam de nia unua halto ĉirkaŭas nin scivolemaj infanoj. Ĉiu vilaĝano vokas kaj salutas nin, de mateno ĝis vespero. Evidentiĝas, ke ni ne anonime trapasos tiun landon.

Ĉiu pasanta aŭto hupas al ni, eĉ kiam ni bone dekstre flankas. Post alkutimiĝo ni eĉ ne plu rimarkas tion, eĉ kiam ni troviĝas meze de la vojo. Sed koncerne aŭtojn, precipe rimarkeblas la impresa kvanto da Mercedes. Ili ĉie videblas... iuj malnovaj flikitaj, iuj bele novaj, eĉ longkofraj. Suspektindus taksio kiu ne estus Mercedes.

Ankaŭ benzinejoj multnombras. Sur tutlandaj vojoj ili foje troveblas tri aŭ kvar foje en nur unu kilometro. Sed plej mirigas la grandega kvanto da aŭtolavejoj. Aldone al tiuj en ĉiuj benzinejoj, ŝajnas, ke ĉiu malfermis sian propran lavejon, foje sub simpla ladtegmento. Sufiĉas nur investi je altprema ŝprucigilo. Eĉ iuj restoracioj proponas tiun servon. Havu vian aŭton purigita dum vi manĝas;

En la vilaĝoj ĉie videblas "superbazaroj". Fakte, malantaŭ tiu moŝta nomo, precipe kaŝiĝas etaj nutraĵvendejoj. Antaŭ iuj etaj viandvendejoj kamparaj pendas bova viando sur kroĉoj en la ekstero, sen

iu ajn fridsistemo.

▷ Male, Tirano estas moderna urbo. Nia esperantista gastiganto vizitigas la urbon al ni. Li precipe invitas nin al restoracio por ke ni malkovru tipe albanajn manĝaĵojn, kiujn malmultaj turistoj havas la eblecon frandi. Li ankaŭ hepas nin por kontakti nacian sportĵurnalon por aperigi artikolon pri nia vojaĝo.



Ĝi verŝajne estas multe legata ĉar, ĝis preskaŭ la landlimo oni vokas nin per "Gratulon Roz" aŭ "Saluton Roz", anstataŭ ol per "Esperanto", kiel legeblas sur niaj biciklaj ĉemizoj.

lun vesperon, ni petas en bieno, ĉu ni rajtus starigi nian tendon sur la herbejo. Bonŝance, la familia filo laboras de dek jaroj en Londono kaj ni povas komuniki kun li en la angla.



Li proponas ke ni dormu en ilia eksa domo apuda. Sekve li prezentas sian familion al ni kaj invitas nin por kunvespermanĝi. En tiu lando gastigemo ne estas simpla vorto!



La landon ĝis antaŭ nelonge kovris bunkroj por protekti sin de malamikoj eble pli imagaj ol realaj. Oni nuntempe malkonstruas ilin kaj ni eĉ malfacile sukcesis vidi kelkajn laŭ nia itinero. Sed ili ekreaperas kiam ni alprosimiĝas de la makedonia landlimo supre de montaro, kiel grandegaj fungoj ĵus elteriĝintaj post forta pluvo.



Ili bonvenas ĉar ni trovas neniun lokon sufiĉe ebanan kaj diskretan por starigi nian tendon. Ni do instalas ĝin en iu el tiuj gigantaĵoj kiu, plie, ŝirmos nin de la vento. Nur necesas ne forgesi klini la kapon je la iom malalta enirejo. Eble ni tamen devintus kunporti niajn biciklajn kaskojn.

(daŭrigota)

Kial usonano uzas Esperanton ?

Nove renkontitoj foje esprimas surprizon kiam ili ekscias ke mi, usonano, uzas Esperanton anstataŭ la anglan en Japanio. Foje oni eĉ ne kredas ke mi efektive estas usonano, ĉar ili aŭdis min paroli nur Esperanton.

Nu, estas vere ke la plimulto el la usonanoj preferas uzi la anglan. Multaj usonanoj opinias ke la angla sufiĉas, kaj ke ĉiu en la mondo devus lerni ĝin. Kial do mi preferas uzi Esperanton por komuniki kun neusonanoj? Jen kelkaj kialoj:



Amikeco. Dum longaj vojaĝoj mi rimarkis ke la plimulto el la homoj kiuj alparolis min per la angla, ne interesiĝis pri mi kiel homo, nek pri mia kulturo. Ili interesiĝis unuavice pri mono. Aŭ ili volis vendi ion al mi, aŭ ili volis lerni la anglan de mi, por povi ricevi pli bonan edukon kaj pli altsalajran postenon, aŭ ion alian. Kontraste, granda procento de la homoj kun kiuj mi parolas Esperante, interesiĝas pri mi kiel homo, aŭ pri mia kulturo. Multaj el ili deziras amikiĝi, kaj efektive multaj el ili fariĝas amikoj.

Egaleco. Se mi parolas angle kun japano aŭ iu alia kies denaska lingvo ne estas angla, mi ĉiam, nepre, havas la pozicion de

spertulo pri la lingvo, kaj, negrave kiom multe tiu alia persono studis la anglan, li aŭ ŝi nepre parolas el malpli alta pozicio, kiel lernanto al instruisto aŭ subulo al estro. Se anstataŭe ni interparolus per la lingvo de mia kunparolanto, ekzemple la japana, la situacio estus sama sed inversa. Tia malegaleco tre malhelpas la interamikiĝon.

Pordmalfermo. Dum mia longa mondvojaĝo, Esperanto malfermis multegajn pordojn al mi, figure kaj laŭvorte. Mi tranokte gastis en 150 hejmoj de esperantistoj dum la trijara vojaĝo, kaj nur unu nokton mi pagis en hotelo! Pere de Esperanto kaj esperantistoj, mi povis ĝui tre riĉan kulturon, renkonti multajn diversajn homojn kaj konatiĝi intime kun iliaj vivoj, kulturoj, hejmoj, pensoj ktp.

Kelkaj el miaj bonaj amikoj, post jaroj da amikeco, konfesis al mi ke, antaŭ ol renkonti min, ili malŝatis usonanojn. Do, se mi uzus la anglan, mi certe ne povus ekamikiĝi kun tiuj homoj, kiuj nun estas tre karaj amikoj. Esperanto ja malfermis la pordon al ili.

Helpi la mondon. Laborante por disvastigi Esperanton, mi havas la senton ke mi faras ion utilan al la mondo. Se homoj tra la mondo povos libere interkomuniki kiel egaluloj, kaj interamikiĝi per Esperanto, certe la mondo fariĝos pli bona, pli justa, pli simpatia. Mi ne imagas ke Esperanto sola solvos ĉiajn mondproblemojn, sed ĝi ja povas helpi la homojn ellabori solvojn.





Kreemo. Mi tre amas uzi Esperanton, ĉar ĝi kondukas al plia kreemo. Pro la granda fleksebleco en la lingvo, mi sentas liberiĝon verkante aŭ parolante en Esperanto kompare kun la angla, kies strukturo kaj vortstoko estas relative fiksitaj. La ebloj krei novajn esprimojn en Esperanto estas preskaŭ senlimaj; estas granda ĝojo esplori ilin, kaj trovi trafikajn esprimojn, uzante jam ekzistantajn erojn.

Valoraj spertoj kaj memfido. Trairante pordojn malfermitajn per Esperanto, mi ricevis multajn valorajn vivspertojn kiujn mi ne facile povus havi sen Esperanto. Tiaj riĉaj vivspertoj multe kontribuis al mia memfido, kaj preparis min pli kompetente agadi en la mondo.

Nova mondkoncepto. Eble la plej grava profito kiun mi ricevis el mia uzado de Esperanto, estas drasta ŝanĝo de mia mondkoncepto. Antaŭe mi imagis ke la mondo plenas je fremduloj -- homoj tre malsamaj kaj ne alireblaj. Kun "fremduloj" oni ne povas multe simpatii, ĉar ili ja estas fremdaj, ĉu ne?

Tamen, pro miaj travivaĵoj uzante Esperanton, mi malkovris ke tiu imago estis tre erara. La mondo plenas ne je fremduloj, sed je homoj, samaj kiel mi kaj miaj familianoj. Kaj plue, tre multaj el tiuj homoj deziras esti miaj amikoj, se ili havas la okazon renkontiĝi kaj konatiĝi kun mi. Do, ili estas ne fremduloj, sed amikoj aŭ estontaj amikoj.

Kia granda diferenco! Nun mi sentas min reale ligita al homoj tra la mondo. Kaj mi ne plu sentas min katenita al nur unu parto de la mondo, al nur unu lingvo, nur unu kulturo. Mi estas libera interagi kun homoj tra la mondo, ĉar ĉie troviĝas amikemaj homoj, kaj ĉar Esperanto donas al mi la rimedon facile interparoli kun ili.



Joel Brozovsky,
(Usono/Japanio)

El la revuo «*Nova Vojo de Oomoto*»

betulo@mac.com

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/brozovsky.html>

